

CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL BULTENO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO N-RO 102**

N-RO 7 (75), MARTO 2019

Enhavo

Voĉoj de virinoj

Originala poezio. Dulingva verko

Ludmila Novikova Zulfija 3

Originala poezio

Irina Gonĉarova. Kongresa iluzio. Gotika vizio 4

Originala prozo

Tatjana Auderskaja. La bela rozo. Libero 6

Traduko de originala poezio al la rusa el Esperanto

Lenke Szász en tradukoj de Klara Ilutoviĉ Avertó. Vivemo 6

Jubileo

Anatolo Sidorov, Daniil Morozov, Anataŭ 140 jaroj... (pri Volapuko) 7

Viroj verkas originalan poezion...

Aleksandro Miĉin. Folioj; Foraj ĉielarkoj; Ĥ-poemo 11

*Nikolao Neĉajev. Mi estas ŝipo; Cigno kaj korvo; Rekvieto;
Veĵnen venis; Unuverso; Hajkoj* 13

Espopore. “Ĉielo ĉiel (grize kaj lazure)”; Fulmotondro; Mi amas vin;
Preterpasanto 14

Tradukita prozo

Boris Julskij La barba fanto, traduko de Gennadij Ŝlepĉenko 16

*Miĥail Uspenskij Ampocio, traduko de Mikaelo Povorin; Envulta okulo,
traduko de Moskva tradukista grupo* 22

Tradukita kanta poezio

*Rasul Gamzatov, rusa teksto de Naum Grebnev,
traduko de Gennadij Ŝlepĉenko* 25

Julio Kim. Kanto de Ostapo Bendero, traduko de Paŭlo Moĵajev 26

Rakontoj pri Rusio

Stanislav Belov Kuris lupoj laŭ stratoj... 27

Kultura projekto

Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento 29

“Pri la grafo Leo Tolstoj” en traduko de Ludmila Novikova 29

“Murka” en traduko de Semen Vajnblat 30

“Murka” en traduko de Vladimir Minin 31



Voĉoj de virinoj

Originala poezio. Dulingva verko

Zulfija

Ludmila Novikova (Moskvo)

Teksto, muziko kaj aŭtora traduko el Esperanto



Junokuloj nigraj,
Ĝis tali' harligoj –
Vi min ravas, mia Zulfija !
Lunoserpaj brovoj,
Graciplenaj movoj –
Vi min ravas, mia Zulfija !

Rf. : Ho, pro via belo,
Danca karuselo
Flagras mia sango, Zulfija !
Ardas mia koro
Pro admir-adoro.
Dancu, dancu, mia Zulfija !

Estas vi amreto,
Logas per rideto –
Vi min pleniĝis, mia Zulfija !
Flug' de kolombino,
Paŝoj de carino –
Vi min ravas, mia Zulfija !

Rf.

Floru kiel rozo,
En printemp' mimozo,
Mia sunradio Zulfija !
Se vi min ekamos,
Nia ĝoj' ĉiamos,
Mia kor-jubilo Zulfija!

Rf.

1978-2016

Черноглазым взором
И бровей узором
Ты меня пленила, Зульфия!
Бархат кос волнистых
По плечам струится.
Ты меня пленила, Зульфия!

Припев: Красотой чудесной,
Взлѣтом рук прелестных
Ты зажгла мне сердце, Зульфия!
И оно пылает,
От любви сгорает.
Так танцуй, танцуй, о Зульфия!

В этом юном стане
Грациозность лани.
Ты меня пленила, Зульфия!
Лѣтом вольной птицы,
Поступью царицы
Ты меня пленила, Зульфия!

Припев.

Ты цветѣшь как роза,
Как весной мимоза,
Лучик солнца, моя Зульфия!
Ты меня полюбишь
И счастливой будешь,
Радость сердца, моя Зульфия!

Припев.

2016



Irina Gončarova (*Moskva provinco, Odincovo*)
Kongresa iluzio

Al ...



Esperanta kongreso
Povus ravi eĉ pli.
Dum koncert' de l'sukcesa
Bard' sen Barbo — jen vi.

Vin ne multe atendis
Mi dum iu event'.
Vin atendi ne endis —
Stultas vana atend'.

Ne atendis mi signon,
Nek aludon, nek 'ek!'.
Sed flankigis la dignon
Svaga emo al vek'.

Min neniom konfuzis
Via indiferent'.
Mi ne dubis pri eblo
De alia moment'.

Vin katenis konscio
En real' de la viv',
Ke vi pretus je ĉio,
Reciproke al mi.

Min ĝuigis konscio
De junema anim',
Ke mi pretus je ĉio,
Reciproke al vi.

Esperanta kongreso
Kun gutet' de angor'.
Ĝis revido karesa,
Ree nur en memor'.

14.02.2019



Gotika vizio

Al Verdalin

Mi aperas kune kun lum'
de la pala rondplena lun'.
Ne reflektas min la spegul'.
Daŭre serĉas mi vin, karul'.

En gotika nia kastel'
ie dormas vi sub mantel'.
Mort' ne povas forpreni vin,
dum vin amas via edzin'.

Ĉemizo blanka
ĝis ŝtona planko
kaj nigraj haroj
ĝis la ŝtuparoj.
En la harar —
— enplektita lino.


Eterne junas
la belulino.

Trablov' de vento —
kandelo tremas
kaj estingiĝas.

Mateno venas.

Ĉiel' heliĝas —
degelas steloj.
Neniu vivas
en la kastelo.

2005 (*FaRo-12*)



Originala prozo



Tatjana Auderskaja (Odeso)

La bela rozo

Oni donacis al mi superban rozon. Ĝi estis diafana kaj trembrilis kaj glimis per miloj da lumoj: ruĝaj, verdaj, violaj. Ravita pro ĝia beleco, mi tenere ĉirkaŭpolmis ĝin kaj kaŝis ĉe la sino, proksime al la koro. Sed baldaŭ mi ekhavis tre strangan impreson, kvazaŭ io frida tuŝas mian bruston, kaj poste eksentis, ke malvarmaj fluoj kuras laŭ la korpo.

Kun miro mi gapis – kaj trovis nur grandan malsekan makulon, kiu tiel malagrable incitis la haŭton.

La rozo estis el glacio.

15a de marto, 2018

Libero

Mi estis libera kaj plenpova, mi ŝvebis super nuboj, ludante kun vento.

Neniu egalas min, mi estas la sola reganto de Subĉielo. Sed ho! Aperis de la sudo rivalo, kiu ankaŭ deziras regi la aeron kaj ĉiam rikanas min. Sed ĉi-foje li ne evitos punon. Atako, ankoraŭ atako! Li falas teren, disŝirita de miaj ungegoj. La venko! Mi jubilas, flosante en aeraj ondoj sub suna brilo.


Sed jen subite io tiras min teren. De la pinto de ĝojo mi estas krude ĵetita al tero. Oni prenas min, faldas kaj portas al la domo, kie denove metas en malluman keston.

Mi estas kajto.

Traduko de originala poezio al la rusa el Esperanto

Lenke Szász (Rumanio, Transilvanio)

Traduko de Klara Ilutoviĉ (Moskva provinco, Elektrostalo)



Averto

Aŭskultu la muĝadon de la vento -

Pluvego falas, falas en torento.

Ĉu la patrin' Naturo koleriĝas,

Ĉar ni, ŝiaj gefiloj, ŝin perfidas?

Vivemo

Tra fendeto de asfalto

Ekaperis eta planto;

Sub la krusto sufokiga

Planta semo restis viva.

Ĝojigas min ekapero

De la vivo el la tero.

Предупреждение

Послушай, как зло ветер дует

И ливня потоки бушуют!

Не сердится ль природа-мать

На нас, посмевших её предать?

Жить!

Сквозь асфальт росток пробился:

Куст или цветок родился.

И бессильно камня бремя --

Хочет жить живое семя.

Радуют мне душу силы

Жизни из земной могилы.

Antaŭ 140 jaroj...

I. La Kreinto de Volapuko

En marto 1879 rom-katolika pastro finkompilis tutmondan lingvon taŭga por ĉiuj popoloj kaj enhavanta radikojn de ĉefaj eŭropaj lingvoj. Temas pri Volapuko kaj ĝia kreinto Johann Martin Šlejer. Bedaŭrinde por nuntempa generacio Šlejer estas persono nekonata.

Martin naskiĝis la 18-an aŭgusto 1831 kiel la tria filo en familio de vilaĝa instruisto en Oberlauda. Lia patro Johann Philipp Schleyer (1802-1894) estis vilaĝa lernejestro kaj samtempe instruisto de la popola lernejo; la patrino Katharina Elisabeth Veith (1799-1877) estis dommastrino. Estante 5-jara knabo li komencis viziti lernejon, tamen liaj gepatroj komprenis ke la vilaĝa lernejo ne donos kontentigan kleron.

Feliĉe, onklo Franz Martin Schleyer (1808–1871) invitis lin al Königheim, kie Šlejer ekde 11-jaroj ĝis 15-jaroj studis latinon kaj muzikon. Li estis talenta persono, ĉar scipovis muziki 12 muzikilojn inkluzive harpon kaj orgenon. Kiam en 1881 Šlejer festis la 25-jaran jubileon de sia diservado, la legantoj de *Sionsharfe* (Ciona Harpo) donacis al li harpon. La foto de Šlejer kun la harpo estas vaste konata.

En 1852-1855 Šlejer studas en Universitato de Freiburgo teologion, filologion, filozofion, historion kaj medicinon. Post sia ordinado la 5-an de aŭgusto 1856 en Sankt-Peter, Šlejer diservas kiel pastro en pluraj paroĥoj.

Dum dek jaroj 1875-1885 Šlejer diservis en paroĥo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo en Litzelstetten apud la Konstanca lago, kie li ekhavis la ideon krei lingvon por faciligi la rilatojn inter la popoloj: Volapuko. Šlejer poste diris, ke dio mem gvidis lin dum tiu laboro.

Fakte, antaŭ Volapuko, Šlejer provis fari pli fruan helplingvon, kiun li nomis *Völkerdolmetsch* (Interpretlingvo). La unua ideo de Šlejer tial estis krei skriban lingvon, kiu ekzistu en la ĉefaj lingvoj eŭropaj: germana, angla, itala, hispana kaj rusa. Tial Šlejer en 1878 kreis universalan alfabeton, taŭgan por transskribo de ĉiuj sonoj en ĉiuj lingvoj. Pri tiu alfabeto li opiniis, ke por la kristana Eŭropo unu alfabeto estas same bezona, kiel unu religio.

La 18-an de januaro 1878 Šlejer sendis sian universalan alfabeton al estroj de ĉiuj eŭropaj universitatoj, al Poŝta kongreso en Parizo, al Internacia Centro de Tutmonda Poŝta Unio kaj ceteraj aŭtoritatoj. La alfabeto ricevis laŭdojn. Lia alfabeto havis sufiĉe grandan sukceson, kaj pro tio Šlejer opiniis, ke li estas elektita por krei universalan lingvon por la homaro. Šlejer decidis kompili tutmondan helplingvon.

La 31-an de marto 1879 la lingvo estis kreita en formo de *Volapuko* (Tutmonda Lingvo). En maja suplemento n-ro 35 de *Sionsharfe* aperas *Entwurf einer Weltsprache und Weltgrammatik für die Gebildeten aller Völker der Erde* (Projekto de la tutmonda lingvo kaj tutmonda gramatiko por



Schleyer (Šlejer), Johann Martin, rom-katolika pastro, kreinto de la plan-lingvo Volapük.



kleraj homoj de ĉiuj popoloj de la Tero), en 1880 en la eldonejo *C.Tappen* en urbo Sigmaringen aperis la unua gramatiko de Volapuko.

Ekde la 1-a de januaro 1881 aperas *Volapükabled (lezenodik)* (Volapuko-folio centra), kiu funkciis ĝis 1908.

Ŝlejer estis fame konata pro sia bona scio de lingvoj. Volapukaj propagandistoj asertis ke Ŝlejer posedis 55 lingvojn, aŭ eĉ pli ol 70, tamen fakte li verkis poemojn en 7 lingvoj kaj prozaĵojn en 25 lingvoj.

En 1876-1884 Ŝlejer eldonis la revuon *Sionsharfe (Ciona Harpo, Revuo por katolika poezio)*.

Dum lia vivo okazis tri internaciaj Volapuk-Kongresoj: en 1884 (Friedrihshafeno), 1887 (Munkeno) kaj 1889 (Parizo). En 1887 estis instalita Akademio de Volapuko.

En 1889 en la mondo funkciis 283 Volapuk-societoj; volapukistoj eldonis 124 gazetojn kaj ĵurnalojn; pli ol 1000 diplomitaj personoj instruis Volapukon; estis eldonitaj Volapuk-ŝlosiloj en 25 lingvoj kaj ĉ. 941 lernolibroj kaj literaturajoj.

Ancoraŭ dum lia vivo ĉe la volapukistoj ŝvebis ideoj reformi Volapukon, ĉar regis forta opinio ke la lingvo estas tro arta. Certe Ŝlejer ĉiam estis kontraŭ ajnaj modifoj de la lingvo. Sed la kompleto jam ĝermis. La reformistoj intence okazigis la 3-an Volapuk-Kongreson en Parizo por apartigi ĝin de la kreinto. Kun la reformoj kaj decidoj Ŝlejer ne konsentis kaj ekde 1889 la Volapuko komencas regresi. Multaj volapukistoj ne dezirantaj partopreni en la disputoj kaj diskutoj trovis solvon transiri al la kreskanta Esperanto-Movado.


II. La vojo al Volapuko

El notlibro de Ŝlejer: “La malriĉa vilaĝa pastro en malriĉa paroĥo devas iĝi majstro por ĉiuj aferoj. Hodiaŭ infano falis akvon kaj dronas – vilaĝa pastro devas ekagi por reanimi ĝin. Morgaŭ ekflamos kabano de taglaboristo – la pastro devas estri la laboron de lama fajrobrigado. En alia okazo la ĉarpentisto falas de la ĵuskonstruita konstruaĵo aŭ edzino de instruisto falas de alta lerneja perono kaj ambaŭ sangumitaj atendas kuraciston – la pastro devas fari tre la bezonatan urĝan helpon. En sekva ekzemplo oni trovas en kampo preskaŭ ĝismorte frostiĝintan drinkulon – la pastro provas ankaŭ lin revenigi al la vivo, tamen sensukcese. Per klopodoj de fikomercistoj kaj uzuristoj la loĝejo de vidvino estas disvendata ĝis la lasta tegolo. Pro la malfeliĉego ŝi intencas dronigi sin en Bodena lago. La pastro eksciinte pri tio aktive partoprenas en aŭkcio, elaĉetante ŝiajn amatajn objektojn: la krucifikson, bildojn de la sanktuloj, preĝolibron, kurtenojn kaj, certe, kafmuelilon... por ke post la disvendo redoni la tuton al la konsternita virino. Ĉi ĉion kaj ceterajn en simila speco mi, inventinto de Volapuko, travivis en mia malriĉa vilaĝa paroĥo en Krumbahŭ apud Meszkirch (Bavario) ekde 1867 ĝis la 1875 kaj en Litzelstetten apud la Bodena lago ĉe insulo Majnaŭ (1875-1885), kie mi pasigis malfacilajn 18 jarojn, precize priskribas ĉi tie”.

Ŝlejer rakontas tre instruan okazintaĵon. Lia najbaro vidvo-ĉarpentisto suferis pro la malriĉeco. Li eĉ estis devigita vendi sian loĝejon kaj loĝis en mizera ĉambreto. Malfeliĉe lia ĉambreto brulis kun la tuta lia havaĵo. Post la incendio lia filo ne plu deziris resti apud la mizera patro. La filo planas veturi al Usono. Antaŭ la forveturo la patro diras al la filo: “Kara, se vi atingos Usonon kaj perlaboros iom, do ne forgesu pri mi kaj okaze sendu la monon, almenaŭ kelkajn krejcerojn”.

La filo kun larmoj en la okuloj promesas tion. Li sukcese transpasis oceanon, instaligis en Usono laborante en karbominejo kaj perlaboris monon, sed, ŝajne forgesis pri sia mizera patro.

La patro, kun ruĝaj okuloj pro ploroj, iutage venas al la pastro.



– Mi edukis la infanojn, sed nun mi estas sola. La filino mortis; mia filo estas en Usono, sed demonstras nedankemon.

La pastro konsolante diras:

– Via filo ĉiam estis brava ulo, do ne povas esti, ke li estas nedankema. Ĉu vi eĉ unu fojon skribis al li al Usono klarigante pri viaj problemoj?

La najbaro respondas:

– Certe skribis! Tamen li respondas nenaim.

Laŭ similaj okazoj mi respondis al la najbaro:

– Kara najbaro, ofte okazas, ke adresoj el Usono aŭ al Usono, kiuj devas esti skribitaj laŭ angla ortografia maniero, skribitaj laŭ germana maniero, ne kongruas laŭ tio, kiel oni ilin legas aŭ prononcas. La poŝtservistoj por kiuj la adresoj estas neklaraj, rapide ĵetas similajn leterojn flanken. Sekvafoje kiam vi estos skribota leteron al Usono, alportu al mi adreson de via filo. Mi ĉiam surskribos la adreson en la angla laŭregule...

La najbaro arde dankis min, sekvis mian konsilon kaj alportis adreson de sia filo...

Mi reskribis la fuŝitan adreson laŭ reguloj de la angla lingvo, kaj konsilis al la najbaro senprokraste skribi leteron por la filo al Usono. Li ĉion faris laŭ miaj konsiloj. Evidentiĝis ke la filo sendis leteron kaj monon. Poste mi konstante surskribis adresojn por ceteraj loĝantoj de Krumbaĥ kaj ĝia regiono....

Tiam min kvazaŭ fulmobatis: “Ho, estus bele, se ĉiuj loĝantoj de la Tero anstataŭ malfeliĉe komplikaj ortografioj, mallogikaj kaj malpraktikaj, similaj al la ortografio de la angla lingvo, ankaŭ de la rusa, pola, sveda kaj germana, havus **unu komunan alfabeton**, unu unuecigan ortografion, ja, certe, eĉ unu ĝeneralan lingvon por korespondado. Kiom da ofendoj, suferoj, tempo – kaj monperdoj oni sukcesus eviti...”

Ŝlejer daŭrigas: “Por vere konstati kaj precize konfesi, kiel estis tuŝita mia koro en tiu ekskluziva nokto, mi povas diri nur la sekvan kun grandega dankemo kaj humileco: mia bona gardanĝelo tiam surprize enspiris al mi plenan sistemon de ĝenerala lingvo Volapük. Poste la 31-an de marto 1879 mi unuafoje prezentis skriboforme ĉefajn regulojn de mia gramatiko. De tiu momento mi pro pura amo al tro turmentita homaro foroferis tro multe da tempo, fortojn, sendormajn noktojn, streĉojn de vido kaj nervoj, sanon, ricevitan monon, poŝtelspezojn en miloj da germanaj markoj, mian salajron pastran, eblecon kreskigi enspezon, plibonigi loĝejon, ĝardenon, leviĝi laŭ la skalo de promocioj – ĉi ĉion por mia ĉirkaŭprenanta la tutan mondon ideo; pro ĉio farita mi havas esperon, ke la homaro ankoraŭ dum mia vivo demonstras al mi dankon. Eble eĉ iu milionulo aŭ iu alia farus tiel, ke mi havus senprobleman maljunecon, kiam mi nun vegetas, uzante enspezojn pro miaj junulaj verkoj. Iu senpripense elspezas centojn da miloj kontraŭ strangaĵoj, distroj kaj kapricoj ktp., se li estante patrono kaj mecenato por la nobla ideo, povus por ĉiam eternigi sian nomon”.

Post la komuna alfabeto al Ŝlejer venis pli bona ideo – krei tutmondan lingvon.

La unuaj informoj en la artefarita lingvo aperis en *Ciona Harpo*, la unua eldono de gramatiko kun la unua listo de volapukaj vortoj en 1880. De tiam famo pri ĉi genia lingvo dum kelkaj jaroj disvastiĝis tra la tuta civilizita mondo. En la unuaj jaroj de la ekzisto de Volapuko la volapuko-kluboj aperis en ĉiuj mondopartoj, aperis lernolibroj kaj vortaroj, estis emisiitaj volapuko-ĵurnaloj kaj oni ĉie diligente studis Volapukon. En multaj landoj estis aranĝitaj renkontiĝoj de novicoj de Volapuko. En 1884 en Fridriĥshafeno ĉe Bodena lago okazis la Unua kongreso de volapukistoj, la Dua kongreso en 1887 en Munkeno. Dum la Dua kongreso estis fondita Akademio Volapuka, al la Volapuko estis aldonitaj kelkaj plibonigoj. La plibonigoj, konfirmitaj de Ŝlejer, vere estis bezonataj kaj valoraj. Post la Dua kongreso Volapuko ricevis la plej vastan disvastiĝon kaj apogeon de la famo. Se ĉiuj estus kontentigitaj pro la granda sukceso, la Volapuko konkerus la tutan mondon kaj la homaro havus por internacia komunikado la solan ilon de komunikado!

Tamen la eventoj evoluis alimaniere. Estis volapukistoj ne kontentigitaj pro la grandaj sukcesoj de Volapuko. Ili deziris pli grandajn. Profesoro Aŭgust Kerckhoffs en Parizo, kiu kun Ŝlejer laboris por evoluo de Volapuko, proponis novan ŝanĝon por la lingvo. Ŝlejer aktive rezistis kontraŭ la ŝanĝoj. Sed Kerckhoffs kun siaj subtenantoj ignoris protestojn de Ŝlejer plenumante siajn ideojn. Ili eĉ aranĝis, spite de volo de Ŝlejer, novan kongreson, en Parizo, kaj konservis Akademion de Volapuko anstataŭ Akademio de Ŝlejera Volapuko kaj daŭrigis ŝanĝi la lingvon. Pro tio estis neniiĝita unueco, tre grava por la internacia ĝenerala lingvo.

La skismo iĝis realo.

Bedaŭrinde dum la ŝanĝoj Ŝlejer ne defendis reformitan en 1887 Volapukon, sed cedis al la deziroj de kelkaj siaj amikoj kaj komencis ŝanĝi Volapukon mem. La ŝanĝoj ne simpligis la lingvon, sed malsimpligis ĝin. Pro la agoj en la Volapuko-movado regis kaoso kaj adeptoj deiris for de Volapuko.

Estas fakto, ke konkurantaj ĝeneralaj lingvoj gajnis de la malfeliĉa stato de Volapuko. Ŝlejer senespere batalis por sia ido. Pro la mona manko, kreskanta indiferenteco kaj ankaŭ pro sia granda aĝo li mem estis devigita ĉesi eldoni siajn vortaron kaj volapuko-gazeton. Ŝlejer la lastajn jarojn de sia vivo vivis en ĉagreno pro la sendankeco kaj indiferenteco de la homaro.

En 1885 Ŝlejer emeritiĝis pro sanstato. En 1894 Papo Leono la XIII-a iĝis lin papa prelato. Ŝlejer mortis la 16-an aŭgusto 1912 en Konstanco.



La 23-an aprilo 1914 Albert Sleumer, la vica volapukista Cifal (Ĉefo) instalis en Konstanco marmoran bareliefan tabulon kun portreto de Ŝlejer sur fasado de domo laŭ Schottenstrasse, 37, en kiu mortis la monsinjoro. La tabulon faris loka merita skulptisto Emil Fugazza. La tabulo enhavas surskribojn en la germana kaj Volapuka lingvoj: *In diesem Hause wohnte vom Jahre 1889 ab bis zu seinem Tode, am 16 August 1912, Mons. Johann Martin Schleyer, Ersinner der Allsprache „Volapük“.* // *Mebastoni ät epladons Volapükans fiedik se läns bals Tala in yel 1914.* (“La ŝtontabulon instalis fidelaj volapukistoj el dek landoj de la Tero en 1914 jaro”). En Konstanco estas Schleyer-vojo.

La 26-an aŭgusto 1931 en Oberlauda apud la naskiĝdomo de Ŝlejer, okaze de la 100-jara naskiĝtago okazis soleno.

Hodiaŭ ĉe la pastra domo en Litzelstetten sur memortabulo estas legebla vaste konata slogano *Menade bal – püki bal* (“Al unu homaro – unu lingvon”). Ankaŭ en Litzelstetten estas Schleyer-strato. En la proksima urbeto Lauda funkcias lernejo, nome: Martin-Schleyer-Gymnasium Lauda-Königshofen.

Ekde 1880 por la propagando kaj praktika apliko volapukistoj emisiis volapukaĵojn, kiuj nun estas veraj raraĵoj ĉe la kolektantoj: volapukaj poŝtkarto kaj glumarko. Jam en 1886 ekzistis volapukaj insignoj, kravatpingloj, broĉoj, kruĉoj, ĉampanoj, likvoroj, cigaroj, lampoj, ĉapeloj, kraĵonoj, valso kaj himno. En 1887 sur Rejno ekveturis la vaporŝipo *Volapük*.

La bonaj iniciatoj havas tradicion: aŭtune 2012 en la naskiĝloko de Ŝlejer, Oberlauda, la tiea Hejmlanda Asocio aranĝis kunvenon kun prelego pri la vivo de la plej fama filo de la vilaĝo kaj anonciĝis la fakto, ke loka vin-bieno, aplikanta bio-dinamikan agrikulturon, lanĉis Volapuk-vinon “Edition J.M.Schleyer” el la vito Müller-Thurgau. El ĉiu vendita botelo unu eŭro estas akumulata por la kreo de Volapuk-placo en Oberlauda. La 9-an de septembro 2013 en Oberlauda okazis malfermo de la Volapuk-placo.

*Anatolo Sidorov, Esperanto-historiisto (Sankt-Petersburgo),
Daniil Morozov, Vicifal, Akademiano Volapuka (Jekaterinburgo).*

Viroj verkas originalan poezion...



Aleksandro Mitin (*Niĵnij Novgorod*)

Folioj

Folioj flavruĝaj, feliĉaj
Sur stratoj kirliĝas fabele.
Vidaĵoj mirindaj, vertiĝaj.
Tre bele! Tre bele! Tre bele!

Folioj faladas fiere,
Facile ŝvebante laŭ ventoj...
Kaj poste bruniĝas surtere
Sen flamo, sen fruktoj, sen sentoj.

Disfloras ne ĉiu talento,
De multaj nenio plu restas.
Ekflagras, ekflugas laŭ vento,
Kaj falas, faltiĝas... Forestas.

Ĉar gravas kompreni pri l' tempo:
Necesas rimarki, ke bruas
Fruktonta florad' en printempo.
Folioj ekflami – malfruas...

20-21.10.2014

Foraj ĉielarkoj

Ie alte, trans stelaroj,
En patrio de fabeloj,
Brilas Foraj Ĉielarkoj,
Naĝas bravaj Karaveloj.

Kaj apude Bluaj Kraboj,
Rampas borden sub Fenestroj...
Nin atingas gajaj Farboj,
Tamburadoj kaj orkestroj.

Bruas viv' en tiu mondo,
Kiu nin apenaŭ vidas...
Ne okazos la renkonto,
Ĉar parsekoj nin dividas

Kaj plu kreskas la dogano:
Ne surpaŝos la ferdekon,
Tiu aliplanedano,
Kiu aĝas jam tridekon...

4-5.09.2014, Kineŝma

Ĥ-poemo

Ĥemia ĥaoso regadis sur grundo,
Hazarde ŝtonaron surverŝis inundo
Kaj poste, sen vorto de caro aŭ ĥano,
Aperis unua senĥorda terano.

Aŭ estis la Vorto? Egale, eŭgleno
Ne havas pensilon por iu kompreno —
Unua vivulo ne estis komplika
En tiu epoko en mond' arĥaika.

Hazarde ĥordulo aperis sur tero —
Ankoraŭ ne varma, skvamoza ĥimero.
Jen iĥtiosaŭra monstreca muzelo —
Ĥi iris laŭ maroj sen jaĥto, sen velo.

Kaj grundon ekloĝis aliaj kreaĵoj...
Jen triceratop': tero tremis pro paŝoj!
Jen braĥiosaŭr'. Ties kolo ĝirafa
Por alta branĉar' estis vere tre trafa.

Sed ĥor' diosaŭra dum horo malbona
Sen ŝpur malaperis. Eĉ eĥo ne sonas.
Monarĥo de l' ter', sen hezito kaj honto,
Ĥimerojn por ĉiam forigis de l' mondo.

Ho, ĥolerikul'! Sub Supera rigardo
Multfoje okazis tutmonda restarto.
Restaĵojn Li sub teran grundon enŝovis...
Nur arĥeologoj ostetojn eltrovis.

Aperis jam homo; pro sperto praula
Decidis, ke viv' devas esti regula,
En pio kaj preĝoj, kaj sen anarĥismo.
Por ke ne troviĝu en brula abismo,

Monarĥon de l' tero plenigu kontento!
Kaj ĉio do bonus... Sed mankas konsento,
Laŭ kiu dogmar' devas esti eduko.
Ĥu kruc' aŭ lunarko? Kristnask' aŭ Ĥanuko?

Sur ĉiu teren' sia hierarĥio:
Jen multaj paroĥoj en la eparĥio.
Jen metropolitano, jen arĥimandrito
Kaj jen, plej malsupre, monaĥ'-cenobito.

Jen li, kateĥisto por junaj lernantoj...
Sonadis jen psalmoj, ĥoraloj, preĝkantoj.
Vagadis tra l' mond' ekleziaj motivoj...
...Plejmulto troviĝas nun jam en arĥivoj.

Ne indas plu kredi je astrologio,
Je aŭro, envulto aŭ ĥiromancio.

Alia epok': de scienc' kaj teĥniko.
Prosperas ĥemio, fizik', meĥaniko.

Saĝuloj-kalvuloj en densaj ĥalatoj,
Esploras proprecojn de siaj ftalatoj.
Ĉe l' rand' de Svisio aperis impona
Konstruo: koliziiĝilo hadrona.

Jen kron' de nuntemp', kron' de teĥnologio!
Ĉu ni profundigos scienc'on ĝis... Dio?
Ĉu post esploretoj troviĝos la fonto:
Homara ĥirug', arĥitekto de l' mondo?..

septembro-oktobro 2017



Nikolao Neĉajev (Irkutsko)

Mi estas ŝipo

Mia vivo estas maro,
Mia spino estas masto,
Miaj pulmoj estas veloj,
Belaj versoj estas cel'.

Mi navigas el amaro
Al feliĉa, ĝoja vasto.
Tie min atendas beloj
De lirika akvarel'.

Cigno kaj korvo

Tago estas cigno,
Nokto estas korvo.
Apud tiuj birdoj
Vivas mia kor'.

Rekviemo

Por vintro venis rekviemo
Ĉar kore regas avidemo
Al suno, varmo kaj degel',
Ĉar koren juna temo venas.
La koro ree alienas.
Ĉu l' koron trompos marta bel'.

Vejnen venis

Vejnen venis vento.
Vento vekis vervon.
Vervo verkas verson.

Unuverso

Larmoj lagaj lavas landon laran.

Hajkoj

Vintre sub glaci'
Vivas kor', sub la rip'
Vivas mia kor'.

Rolon printempan
Ludas naturo.Tion
Spektas poetoj.

Espopore
(*Kazahio, Karagandao*)



Ĉielo ĉiel (grize kaj lazure)
Surprizas en iriz' de Univers'.
Sed ni la sangon verŝis ĉirkaŭflue,
Eĉ tra la suna front' kaj lun-revers'.

Kaj restis tie niaj karnaj flokoj,
Sed ni ne sciiis pri supera pred'...
Kaj karaj lokoj – rememoraj mokoĵ
Fariĝis sola nia ebla kred'.

En senrevena vigla militiro
Tra mirindaĵoj de la kugla senc'
Nin ĉiam bridis iu forta tiro,
Kvazaŭ altir' de fino al komenc'.

Kiuj ni estas? Kaj al kio celas?
Ĉu nia brusto estas celtabul'??
Sed ni denove ŝtalajn birdojn selas,
Tatuas fajrajn lopoĵn sur tabu'.

Dum plumban firmamenton ŝiras alo,
Dum flugan tenton traktas la restint',
La sal' de l' tero iĝas simpla salo,
El flugopunkto de l' plej supra pint'.

Fulmotondro

Ĉiele kavas tru',
Ĉielo havas propran honton.
Kaj tiu nigra bru'
Dishakas rompe horizonton.

Blindigas onin mil'
Da ventokirloj en tumulto.
Surdiga ventokri'
Sepultas ĉion siakulte.

La sagoj flugas for,
Trafante la nubegoĵn ĝuste.

Por kio ja ĉi fort' ?
Por ke ajn io sekvu juste.
Jen kia granda glor' --
Malvenki sur la firmamento...
Nur via pura plor'
Firmsenkulpigas ĉi-momenton.

Mi amas vin

“Mi amas vin”, -- mi ripetadas verve,
Kaj en anim' denove floras verde
Enorma hort'. Kaj fruktoj de ĉi sort'
Pli elokventas, ol la viv' aŭ mort'.
Dolora or' ! Kaj tia estas ver' ... Ve!
Kvazaŭ fantom', sekvante kaŝobserve,
Mi perdas vin kun tim' ĉe via pord'.
Ne puffparol', necesis sola vort' ...
Mi amas vin!
Kaj kion fari? Ami senrezerve...
Nin ebriigus floroj, suk' de l' herboj,
Se vi konsentus vivi en konkord'.
Sed pli kruelas, certe, monda ord' ;
Pikas skribaĵ' obsede kaj acerbe --
“Mi amas vin”...

Preterpasanto

Al nekonataj anguletoj
Vin povas logi ekzistad' ...
Sukcena Universa stat'
Sukcese kaptas viajn vetojn,
Timegojn, zorgojn, kveleretojn,
La songojn el suker' kaj lad'.
Vin ne varmigis mondvakuo,
Dronigas densa tempo vin.
Sed prototipo de Savint'
Videblas en de vi okuloj
Kaj eternec', kaj multmakuloj,
Hontinda glor', fiksita fin' ...
Kiu ja estas vi, vaganto?
Ni nun ekvidos, post la halt'.
Kaj fruktodonas la bazalt'
De via forto esperanta,
Facile monumentiganta
Sin daŭre en ĉiu fald' ...

Tradukita prozo



Boris Julskij

Boris Mihajlovič Julskij (1912-1950?) estis talenta verkisto inter rusaj enmigrintoj en Ĉinio en unua duono de 20-a jarcento. Li naskiĝis en 1912 en urbo Irkutsk. En 1919 lia familio transmigris en Manĉurion, kaj post vagado en 1921 haltis en Harbino. Tie li sukcese finis kursojn de la Unua meza linceo, kaj iĝis studento de la Politeknika instituto. Sed post du jaroj li lasis la instituton, kaj ekde tiu tempo komenciĝis lia literatura agado. Liaj noveloj kaj rakontoj unuafoje estis publikigitaj en harbina revuo "Rubej" (Limo) kaj poste en aliaj eldonejoj ekde 1933-1945. En 1932 li laboris kiel korespondisto en ĵurnalo "Nia vojo". En 1938 li forveturis servi en taĉmentoj de rusa mont-arbara polico. Dum la periodo li verkis multajn rakontojn pri batalado kontraŭ ĉinaj rabistoj. En 1941, kiel idea monarkisto, li vizitis Harbinon, kaj iĝis laboranto de rusa radio. En 1945 li denove revenas en tajgan Manĉurion. En tiu jaro, kiam Ruĝa armeo liberigis Manĉurion, li estis arestita, kaj sendita en koncentrejon en rusa regiono Kolima. En 1950 li fuĝis el la koncentrejo. Lia posta sorto ne estas konata.

La barba fanto

Matene, kiam Andreo Ivanoviĉ iras servi kaj preterpaŝas montrofenestroj de granda ĉiovendejo, li antaŭ ĉio salutas Eleonoron... Andreo Ivanoviĉ por momento haltas, rigardas al ŝi, kaj iomete, preskaŭ nerimarkeble kapsalutas kaj pense ridetas ŝin. Riverenci kaj malkaŝe rideti al ŝi li ne kuraĝas, ĉar tion rimarkos pasantoj.

Eleonora ne respondas al li. Ŝi ĉiam staras, iomete duonturninte sin, kaj rigardas super kapo de Andreo Ivanoviĉ ien en sian nekonatan malproksimon. Ŝi ĉiam revas, kaj ĉiam ridetas iomete triste, sed karese.

Andreo Ivanoviĉ rigardas al Eleonoro, kaj suspiras. Li suspiras ne pro tio, ke Eleonoro ne respondas al liaj kapsalutoj, – ŝi ja ne povas respondi... ŝi ne povas respondi ĉar Eleonoro nur estas eleganta manekeno en montrofenestro de ĉiovendejo. Sed suspiras Andreo Ivanoviĉ en tiu momento, triste enpensigante pri tio, kial ne ekzistas en reala vivo virinoj similaj al ŝi?

Eleonoro efektive estas belega! Ŝia aspekto tute ne similas al ordinara, puca vaksa pupo, staranta en ligna senviva pozo. Eleonoro estas el Parizo, kaj per tio ĉio estas dirita... Ŝia pozo plenas je viva gracio. Ŝajnas, ke ŝi haltis nur por momento kun mirinde eleganta kapturino. Eĉ ŝia vizaĝo ne aspektas kiel masko de pupo. Nekonata pentristo enmetis en ŝian vizaĝon revon pri sia Beatrico, verŝajne por tio, ke homoj rigardu kaj lamentu, ke la vizaĝo ne estas viva, ne natura homa vizaĝo.

Andreo Ivanoviĉ jam dum du jaroj amas Eleonoron. Lia amo estas stranga! Sed tio efektive tielas. Eĉ nomon "Eleonoro" donis al ŝi li mem, kaj ŝi ĝin havas nur sole por li. En amo nomo havas grandan signifon, kaj Andreo Ivanoviĉ donis al ŝi plej amatan karan nomon, kiu foje ridetis al li el paĝoj de jam delonge forgesita romano de Walter Scott.

Andreo Ivanoviĉ estas iomete revema homo. Sed tio helpas en la vivo! Li scias konatan veron, ke ĉiu mem faras sian sorton. Li ankaŭ konas la fakton, ke ne havi feliĉon, kaj havi malfeliĉon estas tute diversaj aferoj. Pro tio li ne strebas trovi la unuan, ĉar timas la duan. Li ankaŭ scias, ke vivo, propradire, kvietas, se nur ĝi estas simpla.

Sed lia vivo efektive estas simpla. Jen nur se Eleonoro... Sed oni rajtas ja permesi al si ion helan en la vivo! Kaj Andreo Ivanoviĉ amas Eleonoron. Ĉiumatene, haltante apud ŝi, li ĉiam kapsalutas ŝin – sed nur iomete, por ke pasantoj ne rimarku tion. Tio estas nur ilia sekreta interkonsento – lia kaj de Eleonoro. Andreo Ivanoviĉ eĉ estas feliĉa, ke pri lia amo neniu konjektas.

Se pri tio ekkonus homoj, ili, verŝajne, dirus: "Kial tia plenaĝa kaj barba persono ludas pupon?!" Cetere, ili estus pravaj: Andreo Ivanoviĉ, efektive, portas vastan barbon similan al barbo de Aleksandro la Tria, kaj li estas tridek ses jaraĝa. Nur liaj okuloj tute similas al okuloj de junulino – kvietaj kaj blujaj. Sed kiam homo portas barbon, ĉu iu fiksas koloron de ties okuloj?

Li oficas sur dua etaĝo de la ĉiovendejo. Tie troviĝas lia metiejo. Andreo Ivanoviĉ estas majstro-gantisto, specialisto pri diversaj gantoj, kiujn li akurate tajlas kaj kudras. Li laboras ekde la naŭa de mateno ĝis la sesa de vespero kun paŭzo por tagmanĝi.

La gantoj estas farataj el diversaj ledoj: el la kaprida, artefarita... Andreo Ivanoviĉ estas vestita en jako, kiun kovras blua kitelo. Li sidas ĉe tablo, ŝablondeseĝnas per kredo, kaj eltondas konturojn de estontaj gantoj. En la metiejo odoras je ledoj. En laborĉambro takte frapetas kudromaŝinoj, tajloroj kudras pantolonojn kaj robojn. Sub plafono en vico pendas kostumoj kaj ledaj jakoj. En fostetoj de sunaj radioj giras iriza polvo...

Andreo Ivanoviĉ estas fraŭlo, kaj luas ĉambron sur la dua etaĝo de gastejo, kiu similas al komundomo kun koridora sistemo. Najbara pordo de la ĉambro apartenas al *madame* Matilda. Sur la pordo troviĝas tabuleto kun skribaĵo:

KIROMANCIISTINO

Madame Matilda

Mandiveno, kartaĝuro kaj sortdiveno

Sub la plateto estas desegnitaj tri divenkartoj, kiuj estas ventumile disŝovitaj, kaj sur kiuj oni povas vidi prezentajn de ĉerko, urso kaj ringo.

Madame Matilda (kia splenda nomo!) havas tre belajn ŝultrojn, ardan rigardon, kaj surfrunte buklon de nigraj haroj. Ŝi ankoraŭ junaspektas, – ŝi estas nur tridekok jaraĝa, – kaj pro rigardo de ŝiaj ardaĵoj povas ekflami eĉ sperta pri amo, enuanta dandy.

Madame Matilda ankaŭ havas kversimilan voĉon. Ŝi portas eksmode susurantan silkan robon, kiu strikte kovras ŝian iomete dikan trunkon. Kiam ŝi ridetas, ŝajnas, ke degelas ora mielo en brilanta sunradio.

Madame Matilda kiam renkontiĝas kun Andreo Ivanoviĉ, ĉiam kun rideto demandas lin:

– Kiel Vi vivas, najbaro?

Andreo Ivanoviĉ rigardas al la degela mielo, iomete ĝeniĝas – li estas timida – kaj respondas:

– Bone, dankon. Sed kiel Vi?

– Jen enuas... – respondas madame Matilda, ludante per la okuloj. – Vizitu min. Mi divenos al Vi je feliĉo pro enuo...

*Andreo Ivanoviĉ konfuzite rifuzas la proponon, dankas ŝin, kaj foriras en sian ĉambron. Tie li sidiĝas sur amata eluzita fotelo, kaj ĝis malfrua vespero legas romanojn de *Dumas* aŭ *Ponson du Terrail*.*

Sed foje Andreo Ivanoviĉ tamen decidis esplori arton de *madame* Matilda...

Tio okazis kiam tra la ĉiovendejo, simile al samumo, ekflugis onidiro pri supozaj maldungoj. La servistoj ekkuradis tien kaj reen laŭ ŝtuparo, ekrapmis susuroj, kaj la vizaĝoj de ĉiuj malkontentis, kaj iĝis flavaj.

La majstroj-gantistoj ankaŭ ne estas defendataj kontraŭ hazardoj. Kaj vespere en tiu tago Andreo Ivanoviĉ ne povis legi aventurojn de *Rocambole*. Legante tiun lokon, kie oni priskribis severajn torturojn, li opiniis, ke maldungo pli timindas ol ĉio cetera, kaj ke *Rocambole*, homo de libera profesio, devas timi nenion en la vivo.

Verŝajne pro tio en la vespero Andreo Ivanoviĉ unuafoje akceptis proponon de *madame* Matilda. Tio tielis:

– Kial Vi estas malgaja, najbaro? – ŝi komplete demandis lin, kiam ili hazarde renkontiĝis en la koridoro. – Ĉu ia malsukceso?

– Mi havas malagrablaĵon... – morne respondis Andreo Ivanoviĉ, rigardante malsupren.

– Bonvolu iri kun mi! – kun karesa decidemo diris *madame* Matilda, prenante la majstro-gantiston je kubuto. – Nun mi ekscios ĉion, kio atendas Vin...

Kaj Andreo Ivanoviĉ nekuraĝe ekiris. Li unuafoje trafis en la ĉambron de *madame* Matilda, kaj rimarkis, ke ĝi tute ne similas al azilo de magiisto aŭ sorĉisto. Tie estis sofo kun komforto de broditaj kusenoj, sur bretaro troviĝis diversaj luksaĵetoj, kaj en angulo antaŭ ikono flagretis frambkolora fajreto malantaŭ kupra punto de lucerno.

– Sidiĝu, mi petas, – diris *madame* Matilda, kaj prenis de sur la bretaro ludkartaron.

Andreo Ivanoviĉ rigardis sur tablon, kie la ludkartoj mole kuŝiĝis en apartajn amasetojn. *Madame* Matilda subite haltis kaj multesignife demandis:

– Ĉu Vi scias, kiu Vi estas?

– Kiel?... – ne komprenis Andreo Ivanoviĉ, kaj konfuziĝis.

– Vi estas trefa fanto! – diris *madame* Matilda, ludante per rigardo, kaj ordigante nigran buklon sur la frunto.

– Tamen... – perpleksiĝis Andreo Ivanoviĉ. – Ĉu ekzistas fanto... kun barbo?..

– Tio ne gravas, – ekridetis *madame* Matilda, kaj Andreo Ivanoviĉ denove ekvidis kiel degelas la mielo. – Tio ne gravas, sed gravas, ke Vi ankoraŭ ne estas olda. Kaj estas fraŭlo... – aldonis ŝi, malleviĝante la okulojn.

Finfine ankaŭ majstro-gantistoj povas havi fatalajn zigzagojn de la vivo, kaj Andreo Ivanoviĉ komencis atente observi kiel *madame* Matilda dismetis ludkartojn. Ŝi ankoraŭfoje klasis apartajn amasetojn de la ludkartoj, metis siajn manojn sur la tablon, kaj komplete diris:

– Unue, Vi havas malreciprokan amon...

– Kio?! – surpriziĝis Andreo Ivanoviĉ. Li volis indigne rifuzi la supozon, sed subite stumblis kaj tre ruĝiĝis. Li ial rememoris Eleonoron...

– Ĉu mi konjektis? – mallaŭte demandis *madame* Matilda.

– Ne... Vidu... mi volis sciigi pri materialaj sukcesoj... – implikiĝante eldiris Andreo Ivanoviĉ. *Madame* Matilda scivole ekrigardis al li, kaj iel malgaje ekridetis.

– Bone, – ŝi respondis. – Mi diros al Vi... Estonte Vin atendos malsukceso, sed ĝi preterpasos. Via feliĉo dependas nur de Vi. Al Vi necesas nur tre ekvoli, etendi la manon, kaj la feliĉo vizitos Vin. Povas esti, ĝi pli proksimas, ol ŝajnas al Vi mem...

Poste *madame* Matilda iomete levis la ŝultrojn, kaj tuj miksis la ludkartojn. Andreo Ivanoviĉ levigis de ĉe tablo.

Dum adiaŭo li strabe ekrigardis al trefa fanto, kiu kuŝis sur la tablo. La fanto fermetis la okulojn, kaj al Andreo Ivanoviĉ ŝajnis, ke tiu moke ridetas. Andreo Ivanoviĉ ankoraŭfoje strabe ekrigardis la ludkartojn, per la brako apogis sin surtable, kaj nerimarkeble turnis la subridantan fanton vizaĝe kontraŭ la tablo.

Akompanante la majstro-gantiston ĝis elirejo, *madame* Matilda kun eta riproĉo diris:

– Nu, kial Vi ne amas virinojn?

– Ĉu mi?! Kial? – konfuziĝis Andreo Ivanoviĉ.

– Vi diris, ke Vi ne bezonas amon... – rimarkis *madame* Matilda, kaj silente komencis ludi medalionon surbruste.

– Sed kial do ne... – konfuzo murmuris Andreo Ivanoviĉ. – Male, mi... – kaj li tuj perdis parolkapablon.

Ĉi-vespere la legado tute ne estis plezura por Andreo Ivanoviĉ. Li turmentiĝis pro siaj nelertaj respondoj, rememoris Eleonoron kaj *madame* Matildan, kaj denove turmentiĝis pro sia lasta frazo. Efektive, por kio Dio turmentas la homojn per timideco?..

Madame Matilda parte pravis. Andreo Ivanoviĉ efektive ne serĉis romantikajn ekscitecojn. Al li ne plaĉis junulinoj, kiuj tre volis kinematografiajn ampasiojn, amemaj kiel oceano, kaj plorantaj kiel akvofaloj. Sed jen se Eleonoro...

Sed ne ĉiuj konas legendon pri Pigmaliono, kiu per forto de sia amo vivigis statuon de Galatea. Ankaŭ Andreo Ivanoviĉ ne konis ĝin. Tial mirinda Eleonoro ne havis ŝancon viviĝi kaj malsupreniĝi de sur sia piedestalo en montrofenestro de la ĉiovendejo.

Ho, Eleonoro, Eleonoro!.. Ŝi estis mirinde belega en sia nova printempa vesto: en fajroruĝa peltaĵo, kiu ĉirkaŭvolvis la kolon kaj mentonon, kaj en malpeza kremkolora palto. Sed en frua printempo la koro tre emas al beleco! Kaj, verŝajne, pro tio Andreo Ivanoviĉ en tiu tempo pli daŭre haltis antaŭ la montrofenestro ol en ceteraj tagoj.

Nun en la animo regis kvieto. Minaco de la maldungo forflugis kiel fumo, kaj vizaĝoj de la oficistoj denove iĝis rozkoloraj, kaj irado malpli senorda kaj hasta.

Madame Matilda, renkontante la majstro-gantiston en la koridoro, ĉiam interesiĝis pri lia afero, kaj invitis lin al si. La mielo de ŝia rideto pli ofte degelis pro printempa suno. Kaj Andreo Ivanoviĉ jam trifoje trinkis teon en ŝia ĉambro. Kaj lastfoje li tre konfuzita eĉ forportis ŝian donacon, nigran satenan kusenon, sur kiu oni brodis per oro: "Ĉiam memoru".

Pasis tempo, moviĝis horloĝmontriloj – etaj akraj lancoj, kiuj nerimarkeble, sed kontinue trapikas ĝis kiam alvenos morto.

Foje matene, alirinte al konata montrofenestro, Andreo Ivanoviĉ anticipe ekridetis kaj rigardis al ĝi. Sed ankoraŭ defore timiga malpleno en la montrofenestro mirigis lin... Li rapide alproksimiĝis kaj ekvidis, ke Eleonoro forestas.

Tre surprizita, li eniris en la ĉiovendejon, kaj supreniĝis en la metiejon. Dum la tuta tago al li ŝajnis, ke mankas io grava, ke ne estas farita ia aĵo, kvazaŭ li forgesis ion, kion necesus memori...

En fino de labortago Andreo Ivanoviĉ aliris al unu el la oficistoj el fako de pretaj vestaĵoj, kaj nur post longa paŭzo decidis pridemandi.

Respondante al lia demando, la komizo nur ŝvingis la manon, kaj grimacis.

– Hierau oni frakasis... – li diris malplezure. – la kapo rompiĝis en

pecetojn. Estis el mastiko...

"Oni frakasis"... "El mastiko"... Andreo Ivanoviĉ per vataj piedoj eliris el la ĉiovendejo kaj, ne rigardante la malplenan montrofenestron, transiris straton. Granda malĝojo posedis lin. Kaj kun subita timo li ekpensis, ke kio okazus, se Eleonoro estus viva, kaj poste subite formortus... Do oni povas ami iun nur por poste perdi tiun?

Mediteme transirante straton, Andreo Ivanoviĉ por momento haltis. Transverse al li tre rapide moviĝis kvazaŭ linko dika blua aŭtobuso, kaj laŭte hupis. Andreo Ivanoviĉ aŭtomate faris du paŝojn malantaŭen. Subite io tre forta krutfalĉis liajn piedojn, suprenĵetis, transturnis, kaj forte puŝis la nukon kaj dorson kontraŭ asfalto. Li por momento ekvidis super si kurbiĝintan, akvecan, kvazaŭ adulteritan ĉielon, kaj poste tuj enfalis en nigrecon.

Li rekonsciiĝis en ambulanco. Juna blonda helpkuracisto, klininte sin super li, frotis al li la tempiojn. La ambulanco ne moviĝis, kaj tra malfermitaj pordoj rigardis scivolemuloj. La gapuloj laŭte interparolis.

– Kie mi estas?.. – per mallaŭta voĉo diris Andreo Ivanoviĉ, prononcante banalan, sed sufiĉe permesitan en lia situacio, frazon.

– Kuŝu kviete! – severe avertis la helpkuracisto, kaj edife aldonis: – Kial vi ne singardas, sinjoroj?..Necesas atente rigardi. Ĉiam rigardu!

Andreo Ivanoviĉ iomete moviĝis, kaj volis eksidi. Sed tuj ekdoloris la nuko, kaj akra doloro trapikis la dekstran piedon. Tiam li ekmemoris mortintan Eleonoron, rapide moviĝantan aŭtobuson, kaj neatenditan baton, kiu suprenĵetis lin for de la tero. Andreo Ivanoviĉ ekĝemis, kaj mallaŭte plendis al la helpkuracisto pri doloro en la dekstra piedo.

La helpkuracisto decide mallaĉis boteton de la majstro-gantisto, pripalpis la doloran piedon, poste indigne fermis pordon de la ambulanco antaŭ ies scivolema vizaĝo, kaj diris:

– Via adreso!..

– Por kio necesas la adreso? – per kulpa tono balbutis Andreo Ivanoviĉ. – Mi iel memstare ĝisiros...

– Vi ĝisiros nenien! – denove kolere diris la helpkuracisto. – Vi kuŝu tri tagojn! Vi elartikigis la piedon, ĉu Vi komprenis?

Andreo Ivanoviĉ movis sian dekstran gambon, denove eksentis doloron en la piedo, kaj, suspirante humile nomis sian adreson. La ambulanco eksnufis, trile eligis avertsignalon, kaj mole ekmoviĝis.

Kiam oni komencis levi la majstro-gantiston sur la duan etaĝon, loĝantoj de la domo, maltrankviliĝintaj pro apero de la ambulanco, eliris en la koridoron, kaj sin apogis sur balustrado de ŝtuparo. Andreo Ivanoviĉ honte kuŝis sur brankardo, enŝovinte la barbon en kolumon. Li sentis malagrablون kaj konsciencan honton pro komuna maltrankviliĝo.

Jam en tiu momento, kiam oni komencis enporti la brankardon en lian ĉambron, najbara pordo malfermiĝis, kaj sur la sojlo aperis *madame* Matilda. Ŝi mirinde rigardis al blankaj kiteloj de la helpkuracisto kaj brankardisto, kaj subite ekvidis Andreon Ivanoviĉ-on, kuŝantan sur la brankardo.

– Oh!.. – mallaŭte prononcis *madame* Matilda, alpremis la manon al la koro, kaj ŝia vizaĝo iĝis pli blanka ol la kiteloj.

Tiel oni timas nur tiam, kiam...

Sed pri tio iomete poste.

Sub la kapo de Andreo Ivanoviĉ troviĝis la satena kuseno, sur kiu oni

brodis per oro: "Ĉiam memoru". Li mem kuŝis sur sofo, parte kovrante la piedojn per litkovrilo, kaj aspektis iomete kulpa. *Madame* Matilda en blua silka robo (kiaj ŝultroj!) sidis sur seĝo ĉe la kapo, kun trikaĵo sur la genuoj.

– Dio mia, kiel Vi timigis min! – ŝi diris kun eta riproĉo, balancante la kapon. – Ja oni veturigis Vin en la ambulanco – Kia teruro! Ah, kial Vi ne atente rigardas kiam transiras straton?!

– Vi, verŝajne, pravas... – konfuzite respondis Andreo Ivanoviĉ. – La helpkuracisto ankaŭ diris pri tio...

– Tute estas Vi infano! – kunfrapis la manojn *madame* Matilda. – Vidu, oni ne lasu Vin sola! Al Vi necesas persono, kiu ĉiam zorgus pri Vi, ĉiam troviĝus apud Vi...

Kaj tiam Andreo Ivanoviĉ subite komprenis ĉion. Jes, iufoje ne malfacilas iĝi observema, eĉ rigardante la mondon tra disŝovitaj gantaj fingroj. Kaj Andreo Ivanoviĉ finfine komprenis tion, kion ne povis kompreni ĝis nun.

– Tio estus bona... – kun ega konfuzo li diris. – Sed ĉu eblas trovi tiun homon, kiu...

Madame Matilda levis la kapon, kaj ŝiaj okuloj bruligis Andreon Ivanoviĉ-on ĝis profundo de la koro.

– Eblas! – mallaŭte diris ŝi. – Eblas, se nur Vi...

Andreo Ivanoviĉ fermetis la okulojn, kun aŭdaca decidemo kapjesis, kaj tre ruĝiĝis. *Madame* Matilda klinis sin kaj tenere kisis lian frunton.

La edziĝfestoj estis tre modesta, kaj pri ĝi preskaŭ neniu sciis. Sciis nur najbaroj, ĉar du etaj najbaraj ĉambroj subite malpleniĝis, kaj loĝantoj de tiuj transloĝiĝis en alian ĉambron, pli grandan sur la sama dua etaĝo. Sur pordo de la nova ĉambro aperis plateto kun skribaĵo:

KIROMANCIISTINO

Madame Matilda

Mandiveno, kartaŭguro kaj sortdiveno

En unu certa kvietaj vespero (primavero jam atingis kulminon!) *madame* Matilda kverante diris al Andreo Ivanoviĉ:

– Vidu, mi jam divenis ĉion anticipe... Ĉu Vi memoras, kiam mi aŭguris al Vi je trefa fanto? Ĉu Vi memoras?

– Jes, mi memoras... – enpense respondis Andreo Ivanoviĉ, malleviĝante ĵurnalon sur la genuojn. – Nur vidu... al mi ŝajnas, ke fanto ne povas havi barbon.

– Tio ne gravas... – same kiel antaŭe ekridetis *madame* Matilda. – Tiam Vi ankoraŭ estis fanto: ja la fantoj ĉiam estas fraŭloj...

Andreo Ivanoviĉ profunde vespiris. Li ial rememoris Eleonoron. Sed tio okazis lastfoje. Li jam neniam rememoris pri ŝi.

Probable poste li havis ankaŭ aliajn revojn pli helajn, do pli nerealegeblajn. Sed pri tio konas neniu, krom li mem. Sed nerealegeblaj revoj estas bonaj pro tio, ke pri la revoj konas neniu, do neniu povas forpreni ilin.

Jen la punkto... Ne bedaŭru, ke ĉio finiĝis tiel ordinare, ne malĝoju pri tio, ke Eleonoro neniam vekigiĝis. Ja se ŝi viviĝus, nepre alvenus malĝojo, ĉar sen ĝi ne ekzistas eĉ la plej eta amo.

Bone, ke ĝi mankis. Bone! Ja "ne havi feliĉon" tute alias, ol "havi malfeliĉon". Estus pli bone, se tiuj ambaŭ forestus, kaj la vivo estus simpla.

Antaŭ la duetaĝa griza domo kun koridora sistemo de ĉambroj situas ĝardeneto, ĉirkaŭbarita de malalta ligna barilo. Tie, inter du poploj, troviĝas malnova verda benko.

La popoloj altas, kaj arbopintoj de tiuj estas pli altaj ol nivelo de fenestroj de la dua etaĝo. Jen tial la popoloj konas ĉion, kio okazas en la ĉambroj. Vespere, post sunsubiro, la arboj, balancante arbopinton, interparolas pri ĉiuj eventoj.

Sed la popolojn kompreni povas nur tiu, kiu ankoraŭ ne tute iĝis sensenta en viva lukto, kies la animo ne malmoliĝis, kaj la koro ne iĝis ŝtona. Aliaj homoj aŭdos nur bruon de foliaro, sed komprenos nenian vorton.

Se vi opinias, ke vi kapablas kompreni la arbojn, iru tien. Vizitu la ĝardeneton kun la du altaj popoloj, sed ne surpaŝu florojn, ĉar al tiuj estos dolore.

Sidiĝu sur la verda benko... Eksilentu kaj atente aŭskultu. Ne, pli bone fermu la okulojn, kaj ŝajnigu vin dormanta. Nur tiam vi ekaŭdos, kiel interparolas la popoloj.

Se vi amas florojn, ne ofendas bestojn, kaj kapablas hejmigi orfan hundidon, nur tiam vi komprenos ĉion. Nur kviete aŭskultu, ne moviĝu, ne tusu.

Probable, vi sukcesos ekaŭdi ion novan. Kaj povas esti, la popoloj, kiel antaŭe, parolos pri superbaj ŝultroj de *madame* Matilda, pri la trefa majstro-gantisto, kaj pri belega vaksa Galateo, kiu ne vekigiĝis.

Revuo "Rubej"

Harbin 1938

Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko



Mihail Uspenskij

Mihail Uspenskij naskiĝis en 1950 en Barnaulo. Loĝis en diversaj siberiaj urboj, ekde 1977 ĝis la morto en 2014 loĝis en Krasnojarsko. Ekde 1967 publikigis poeziojn, ekde 1978 – prozon. La ĉefaj ĝenroj estas fantasto kaj scienca fantazio, ofte de ironia, humura kaj satira karakteroj. Aŭtoro de pluraj rakontaroj kaj romanoj, kiuj ricevadis diversajn literaturajn premiojn. Tre popularas lia romano, verkita kunŭtore kun Andrej Lozarĉuk “Rigardu la okulojn de monstroj”.

Ampocio

Ivanon Igoŝin virinoj tre malamis. Tiu aĉaĵo komenciĝis ankoraŭ en la junaĝo. Foje Ivano iris post lerneja dancvespero akompani hejmen knabinon, anticipe demandinte pli aĝajn kunulojn, kion kiel fari. Responde al liaj agoj en la antaŭenirejo de la multloĝeja domo la knabino kruele rimarkis: “Kisu, sed ja ne salivu!” Tio estis la unua, sed ne lasta malsukceso de Ivano. Eĉ kiam li iĝis viro, virinoj lin ne simple malatentis: ili malŝategis eĉ lian ĉeeston! Tio tre dolorigis kaj ofendis Igoŝin. La ofendon li kun neniu dividis, li akumulis ĝin. Krome li akumulis monon.

En la sama urbo, kie loĝis Igoŝin, loĝis alia homo. Unuflanke li estis monavida ĉarlatano, sed aliflanke – reprezentanto de popola medicino. Dependas de la vidpunkto. Igoŝin aŭdis, ke tiu homo faras ampocion, tiom fortan, terure! Tial ĝi ankaŭ kostas ja terure multe. Igoŝin venis al tiu homo kaj petis. La homo klarigis, kiel uzi la ampocion, kiujn kontraŭsciencajn vortojn prononci dum tio, kaj donis al

Igoŝin flakonon. Igoŝin diris, ke li ja bezonas ne etan flakonon, sed tutan sitelon. Li prenis el la poŝo la tutan monon, kiun li ŝparis dum dudek jaroj da senriproĉa laboro kaj foriris kun bele plena sitelo da ampocio.

La sitelon li elportis el la urbo sur riveran bordon. Kaj la ampocion li senhezite elverŝis en la riveron, ripetante dum tio, ke ĉiuj virinoj amsopiru lin, Igoŝin. Poste li lavis la sitelon kaj iris hejmen atendi rezulton.

Matene en la laborejo oni diris al Igoŝin, ke venis komisiono el ministerio, kaj estras la komisionon (ho, Dio!) tiom malica inaĉo, kaj ke Igoŝin preferu foriru ien por ne kolerigi tiun inaĉon per sia aspekto: ja sen tio malagrablaĵoj multas. Sed la inaĉo tamen subite renkontis Igoŝin en koridoro. Kaj ŝi tuj iĝis ne inaĉo, sed ankoraŭ normala kaj alloga virino. Ŝi demandis Igoŝin, kio li estas, kaj invitis lin en restoracion. Ŝi iel finis sian laboron en la komisiono kaj plorsingulte revenis en la ministerion, kie pri ŝi tuj ekcirkulis fifamo. Kaj ĉiuj kolegoj de Igoŝin diris: “Ho, kia ulo!”

Iom post iom la vivo en la urbo iĝis tute fuŝa. La procentaĵo de divorcoj, kiu altis ankaŭ antaŭe, abrupte kelkoblis. Multaj virinoj ankoraŭ eĉ ne konis Igoŝin, sed jam sentis, ke ili ne povas plu vivi kun la edzoj. “Ĉu vi ekamis alian viron?” – demandis de tempo al tempo edzo edzinon. “Aĥ, mi mem ankoraŭ ne scias!” – respondis la edzino kaj, kolektinte enpensigeme la aĵojn de la edzo, elmetis ilin malantaŭ la pordon. Verdire estis ankaŭ pozitivaj faktoj: dezirante plaĉi al Igoŝin, virinoj komencis pli bone vestiĝi, pli aktive partopreni la laboron kaj socian vivon. Pliboniĝis ankaŭ la morala etoso, ĉar ili ĉiuj restis fidelaj al Ivano.

Komence tia vivo tre kaj tre plaĉis al Igoŝin. Li ĉesis labori: lin nutris kaj vestis reprezentantinoj de la serva sfero. Edzoj ekis skribi peticiojn, por ke oni kondamnu Igoŝin pro parazitado. Tamen neniu peticio iris pli malproksimen ol ĝis la unua virino, kiu ĝin renkontis.

Kelkfoje la plej kuraĝaj viroj brutale bategis Igoŝin. Sed kuracistinoj ĉiufoje baldaŭ resanigis lin, kaj juĝistinoj sendis la batintojn malproksimen kaj por longe.

Iom post iom la fortoj de Igoŝin komencis konsumiĝi, kaj tia vivmaniero komencis pezi al li. Li ekkonsciis ankaŭ la tutan egoismon de sia ago rilate al viroj, kiuj antaŭe faris nenion malbonan al li, sed male, kompatis lin kaj promesis trovi por li inon. Foje nokte li vestiĝis virine kaj fuĝis tra la fenestro, trompe preterinte la starantan ĉe la pordo voluntulan sentinelon. Igoŝin kuris tra legomĝardenoj al tiu pocifaranto kaj eksciis, ke sitelo da amĉesiga pocio kostas kelkdekoble pli ol sitelo da ampocio: estas ja sciate, ke akiri korinklinon multege pli facilas ol forigi ĝin. Igoŝin entrajniĝis kaj veturis al Pacifiko.

Nun li vivas kaj laboras sur insulo Ŝikitano kaj nemalbone perlaboras: li ŝparas monon por la amĉesiga pocio. Malgraŭ defcito de viroj sur tiu insulo inoj ne molestas Ivanon: verŝajne ĉar la akvo el tiu rivero ankoraŭ ne atingis la oceanon. Sed kiam ĝi atingos, Ivano jam akumulos monon kaj revenos en la naskiĝurbon, kie pro li oni daŭre verŝas larmojn, disfalas familioj, kaj virinoj vespere eliras sur la riverbordon kaj enpensigeme rigardas foren.

Kaj ĉio iĝos, kiel estis.

Tradukis Mikaelo Povorin (2019)

Envulta okulo

En akuŝejo numero 4 iu virino kuŝis kaj akuŝis la knabon Nikolaj Afanasjeviĉ Permjakov. Kiam Nikolaj Afanasjeviĉ, tiam nur estaĵo, estis alportita por la unua mamutro, la estaĵo aperitis la okulojn kaj rigardis al sia patrino tiel, ke la lakto en ŝiaj mamoj tuj vanuis. Iu olda virino el suba medicina personaro komprenigis al ĉiu deziranto, ke la okulo de l' infano estas envulta.

— La okuleto de l' infano envultas, — ŝi parolis.

Sed la okuleto aspektis kiel normala okuleto. Samkiel la dua. Kvankam la popolo diras: “envulta okulo”, tamen provu diveni, ĉu la liva aŭ la dekstra envultas.

Ĝis kiam la panjon Permjakova oni ne forlasis hejmen, ĉio en la akuŝejo okazis dise-mise. Jen radiatoto krevas, jen ankoraŭ io. Kaj knabo, kiu kuŝis apud Nikolaj Afanasjeviĉ, plenkreskinte iĝis ŝtelisto kaj bandito, estis enprizonigita kaj paferzekutita.

Ankaŭ la hejmo de Permjakovoj iĝis nebonstata. Afanasij Permjakov okaze de la naskiĝo de l' filo unuafoje en sia vivo ekdrinkis kaj drinkas ĝis nun. “Li ne povas satdrinki”, — eksplikas la bopatrino. Koncerne la bopatrino: forbrulis ŝia domo en la urbo Baranoviĉi de Belorusa SSR. La patrino memoris la diraĵon pri la envulta okulo kaj kondukis jam iripovan Nikolaj al okulisto. La okulisto longe enrigardis la envultan okulon tra speciala aparato, trovis nenion specialan, nur konsilis surporti nigrajn okulvitrojn, eĉ preferinde — la spegulajn.

Tiel do iradis Nikolaj Afanasjeviĉ — eta, sed kun la spegulaj okulvitroj, kiel liliputa ciskartisto.

Tamen tiu okulisto, laŭnome Vagrapet Arŝakoviĉ Movtesjan, tiutage ne revenis hejmen post la laboro kaj neniu lin povas trovi, kvankam oni lanĉis tutsovetian serĉadon. Do, ne endis la envultan okulon tra speciala aparato rigardi — ĝi ja pligrandigas, la aparato.

La dato venis — la unua de septembro. Necesas iri lernejon, al Nikolaj oni donis tekon kaj la florojn asterojn.

— Oj, ne licas porti malhelajn okulvitrojn! — insultis la unua instruistino de Nikolaj Afanasjeviĉ. — Tiel nur sole ŝikuloj faras. Tuj demetu!

Do, Nikolaj demetis la okulvitrojn. La instruistino rigardis en liajn okulojn. Post unu semajno devis okazi ŝia nupto. Malen! Fianĉo ŝia, urbofama taksiisto Aleksaĉo, subite ekamis ne ŝin, sed turneantan estradan aktorinon. Li veturigis ŝin tra la urbo, tiel ke ŝi unuvespere kantis tri-kvar koncertojn, forveturis post ŝin, kaj veturadas poŝt ŝi ĉie, krom eksterland'.

Mem Nikolaj kredis kaj diris, ke liaj okuletoj estas malsanaj. Al aliaj okulistoj la patrino lin ne irigis, kompatis ilin. Baldaŭ venis al Nikolaj avizo kun voko al armeaj vicoj. Certe, ankaŭ en la rekrutekzameno estis okulisto — armea kuracisto-oficiro. Tiu konstatis, ke la okuletoj de Nikolaj ne malsanas, sed normalas, kaj necesas servi. Vespere la okulisto iris kun konatino en restoracion, trinkis iomete, sed ebriiĝis ege, frakasis vitrinon kaj multon krome. Li estis devigita pasigi tempon en karcero, pagi multan monon kaj poste li ankoraŭ trafis sub oficirhonoran tribunalon. Unu steleto deopoletiĝis.

Nikolaj estis rekrutita, kaj suboficiro Ogurnoj kondukis lin kaj la aliajn rekrutojn al banejo. Permjakov ankaŭ tien venis en la okulvitroj, kvankam nuda.

— La okulvitrojn, flavbekulo, en civilio lasu, — diris al li la suboficiro kaj demetis de li la okulvitrojn, stumblis sur la glita kuŝbreto, falis malsupren kaj tie rompis siajn brakojn-kruojn.

La soldato ne rajtas porti malhelajn okulvitrojn, se li ne estas “oldulo”. Do, en tiu ĉi regimento komencis okazi diversaj incidentoj; jen soldato dizertas, jen inspekto venas. Dum unu kaj duona jaro oni malpromociis tri komandantojn de l' regimento. Nur kiam Nikolaj iĝis longservanta soldato “oldulo”, li iris al porsoldata magazeno Militvend kaj aĉetis por si malhelajn okulvitrojn. Li surmetis ilin kaj la regimento tuj famiĝis kiel perfekta.

Finservinte kiel decas Nikolaj hejmen ne revenis, sed ekloĝis en granda urbo. Li ĝis tiam ne sciis kiajn okuletojn li ja havas. Ne troviĝis por li la olda virino, kiu dirus: “Nikolaj Afanasjeviĉ, via okuleto envultas!”

Sole ciganinoj, kiam surstrate Nikolaj Afanasjeviĉ demetas la okulvitrojn por viŝi ilin, forĵetiĝas de li kiel de policano. La ciganinoj scias ja, kio kiomas.

Kaj antaŭnelonge li frakasis la okulvitrojn pro glitvojo. Ili nur krakis. Kaj nun ĉiu kaj iu povas senobstakle renkonti la rigardon de Nikolaj Afanasjeviĉ strate, buse, kineje. Nikolaj Afanasjeviĉ ŝatus aĉeti okulvitrojn ĉe tiuj ciganinoj, sed ili diskuras.

Ankaŭ mi mem dum ĉi tagoj vidis lin. Nun mi sidas kaj sentas — io ne tielas. Nu, jen, ankaŭ mia tajpilo romp

*Tradukis Moskva tradukista grupo (1991)
La Ondo de Esperanto. 1992. №1 (2)*

Tradukita kanta poezio

Gruoj

Rasul Gamzatov, rusa teksto de Naum Grebnev, muziko de Jan Frenkel

Мне кажется порою, что солдаты,
С кровавых не пришедшие полей,
Не в землю эту полегли когда-то,
А превратились в белых журавлей.

Они до сей поры с времён тех
дальних —
Летят и подают нам голоса.
Не потому ль так часто и печально
Мы замолкаем, глядя в небеса?

Летит, летит по небу клин усталый
Летит в тумане на исходе дня,
И в том строю есть промежуток
малый —
Быть может, это место для меня!

Настанет день, и с журавлиной стаей
Я поплыву в такой же сизой мгле,
Из-под небес по-птичьи окликаая
Всех вас, кого оставил на земле.

En iu tempo min vizitas penso:
Soldat' mortinta pro kruela sort',
Sub ter' ne kuŝas post batal' intensa,
Sed iĝis blanka gruo post la mort'.

Ĝis nun post tiu temp' li ĉiam vojias,
Kaj krias al vivantoj sur la ter'.
Jen tial ofte kun silent' malĝojas
Ni rigardante gruojn en ĉiel'.

Jen kojne flugas la gruaro laca,
En hor' vespera kun malgaja vok'.
En tiu vic' troviĝas interspaco —
Por mi destinias, ŝajne, tiu lok'.

Alvenos tag' kaj mi kun gruoj vojios,
Ekflugos saman horon de vesper'.
De sur ĉielo birde mi alvokos
Al ĉiuj, kiujn lasis sur la ter'.

Tradukis el la rusa Gennadij Ŝlepĉenko

Kanto de Ostapo Bendero

(el la filmo «Dek du seĝoj» laŭ la romano de I. Ilf kaj E. Petrov, 1974)

Julio Kim, muziko de G. Gladkov

Нет, я не плачу, и не рыдаю,
На все вопросы я открыто отвечаю,
Что наша жизнь – игра, и кто ж тому
виной,
Что я увлекся этою игрой.
И перед кем же мне извиняться?
Мне уступают, я не смею отказаться.
И разве мой талант, и мой душевный жар
Не заслужили скромный гонорар

Пусть бесится ветер жестокий
В тумане житейских морей.
Белеет мой парус такой одинокий
На фоне стальных кораблей

И согласитесь, какая прелесть
Мгновенно в яблочко попасть – почти не
целясь.
Орлиный взор, напор, изящный поворот,
И прямо в руки – запретный плод.
О наслажденье – скользить по краю.
Замрите, ангелы, смотрите – я играю.
Моих грехов разбор оставьте до поры.
Вы оцените красоту игры.

Пусть бесится ветер жестокий
В тумане житейских морей.
Белеет мой парус такой одинокий
На фоне стальных кораблей

Я не разбойник, и не апостол.
И для меня, конечно, тоже все не просто.
И очень может быть, что от забот моих,
Я поседею раньше остальных.
Но я не плачу, и не рыдаю.
Хотя не знаю, где найду, где потеряю.
И очень может быть, что на свою беду,
Я потеряю больше, чем найду...

Пусть бесится ветер жестокий
В тумане житейских морей.
Белеет мой парус такой одинокий
На фоне стальных кораблей
Пусть бесится ветер жестокий
В тумане житейских морей
Белеет мой парус такой одинокий
На фоне стальных кораблей

Ne, mi ne ploras kaj ne lamentas:
Al la demandoj mi malkaŝe elokventas,
Ke l' vivo estas lud', kaj ĉu do kulpas mi,
Ke min absorbis ludo tiu ĉi?
Kaj ne necesas pardonon peti:
Se oni cedas, ĉu mi povas do retreti?
Ĉu kun la sento-ard' kaj alta kvalifik'
Mi restu sen modesta gratifik'?

Refreno:
Frenezu la vent' senkontrola
En la ĉiutaga malklar'...
Blankadas ja plu mia vel', tiom sola
Sur fono de ŝtala ŝipar'.

Konsentu, karaj, ke estas beno
La celo-centron trafi tuj sen ajna peno!
Impeta ard', rigard', bel-gesta
akompan', –
Kaj la ĉasaĵo – jam en la man'!
Ha, kia ĝuo – la riskon glori!
Anĝeloj, haltu kaj rigardu min aktori!
Pri miaj pekoj cent forgesu por minut',
Sed provu taksu l' ĉarmon de la lud'.
Refreno.

Mi ne instruas kaj ne konsilas,
Ĉar ankaŭ mia vivo tute ne facilas,
Kaj estas granda ŝanc', ke pro la sorto-
frap'
Tro frue iĝos griza mia kap'.
Sed mi ne ploras, kaj ne lamentas
Eĉ malgraŭ tio, ke l' rezult' ne
evidentas:
Perfidis min la sort' eĉ malgraŭ mia
kred' –
Kaj mia perd' pli grandos ol la pred'!

Refreno.

Elrusigis Paŭlo Mojaĵejo

Rakontoj pri Rusio

Kuris lupoj laŭ stratoj...

Stanislav Belov (Tjumeno)

Hodiaŭ estas malfacile mirigi loĝantojn de la siberia urbo Tjumeno per nekutimaj veturiloj. El inter urbaj transportiloj ni ne vidis nur metroon kaj tramon. Tamen estis en la tjumena historio la du ekzemploj, kiam nian urbon vizitis efektive unikaj “veturiloj”, similaj al kiuj de tiam ne plu estis. Cetere tio estis tre, tre antaŭlonge...

La elefanto en ledaj botoj

Ĉiuj ni scias, ke elefanto estas bonega veturilo – por ĝangalo. Facile malsovaĝigebla kaj lernebla, tiu besto iĝis plej malnova buldozo kaj kamiono. Azia elefanto senprobleme transportas sur sia dorso ŝarĝon ĝis 600 kg kaj ŝovas multmetrojn longajn arbegojn. Tamen nur malmultaj scias, ke tia elefanto foje vizitis Tjumenon kaj alvenis ĝi tien ĉi ne en la furgono de vaganta cirko, sed per siaj piedoj, trapasinte laŭ siberiaj vojoj centojn da kilometroj...

Tio okazis en la malproksima jaro 1831. Cetere kerno de afero konsistas ne en antaŭlongeco de eventoj – ja mamutoj ĝis tiu tempo jam formortis kaj ties senharaj parencoj preferis loĝi pli malproksime de tiuj malvarmaj lokoj. Do la elefanto alvenis al ni de sudo, el la fora urbo Kokando, situanta en la okcidenta parto de Fergana valo. Tiea ĥano decidis ĝojigi la rusan imperiestron, sendinte al li kiel donaco la azian ekzotikaĵon – elefanton el la propra bestejo. Fervojoj tiutempe en Rusio ne ekzistis, la pezo kaj la dimensioj de la ŝarĝo sendube superis eblecojn de plej fortaj tirĉevaloj. Do la elefanton oni sendis al Sankt-Peterburgo... piede.

Eskortita de la ĥanaj senditoj, ĝi iris tra Petropavlovsko ĝis Tjumeno kaj de tie ekiris al la gubernia ĉefurbo Tobolsko. La 24-an de aŭgusto neordinara procesio alvenis ĝin kaj haltis por longa paŭzo. Tobolskanoj konstruis por la elefanto vastan kabanon kun ligna planko kaj ĉiutage nutris la eksterkutiman beston per kvar pudoj da greno (64 kg).

Sed ve, post 77 tagoj alvenis la sciigo pri fiasko de la diplomatia misio. La rusa imperiestro ne ekdeziris akcepti nek senditojn de la kokanda ĥano, nek ties donacojn. La 10-an de oktobro la ekzotika kolono ekiris reen. Ŝajnas, ke aziaj gastoj jam nemalbone alkutimiĝis al la siberia klimato, do ili serioze preparis la elefanton al longa vojo. Por la giganto oni kudris lanan mantelon kun ŝaffela substofa kaj anstataŭ “pneŭmatikaj tegaĵoj” surpiedigis ledajn botojn. Tamen alkutimiĝinta al la komforta kabano, ĝi de tempo al tempo lasis la itineron kaj impetis reen, al la varma ĉevalejo en proksima vojstacio. Verŝajne tio estis la unua kaj lasta okazo, kiam sur la Tobolska landvojo oni povis vidi eskortantojn kun lancoj enmane persekutintajn la elefanton en ledaj botoj...

Rusa taĉmento kondukis la bestegon ĝis la arbaro Ĝeti Konur situanta apud la urbo Karagandao. Oni scias, ke 11-an de decembro ĝi trairis la urbon Akmoło. Plue la spuroj de la siberia pioniro perdiĝas en la sablaro de Turkeŝtano...

La paro de grizaj “trotĉevaloj”

El ŝatega de ĉiu rusiano desegnofilmo “Ferioj en Prostokvaŝino” ni scias, ke en Rusio estas ne nur rajdoĉevaloj, sed ankaŭ rajdokatoj kaj eĉ rajdoakademianoj.

Tamen jungitaro, alveturinta nian urbon antaŭ ĉirkaŭ cent jaroj, ŝokis eĉ spertajn vojaĝistojn. Kaj tion kaŭzis eĉ ne malgrandeco de la ĉareto aŭ la nekutima familinomo de la ĉaretisto – Iosif Repeĉek – Tjumenon ja multon vidis. Simple tiutage, timigante kontraŭirantajn ĉevalojn, terurigante hundojn kaj ŝokante frostiĝintajn burĝojn laŭ urbostratoj kuris... la du junaj lupoj, tirantaj la ĉareton kun la sidanta en ĝi viro.

Tiu ĉi historio komenciĝis ĉirkaŭ 1904 kaj apenaŭ ne finiĝis tuj tragike por ĝiaj ĉefaj herooj. Tiujare ĉeĥo-lutisto Iosif Repeĉek revenis al la urbo Ĉitao post laŭvica veturado tra najbaraj vilaĝoj. Bedaŭrinde proksime preterkuris luparo, kiu taksis la aperon de la neparhufulo sur sia tereno kiel la signalo al tagmanĝo. Malfeliĉa ĉevaleto estis forŝirita de la grizaj rabobestoj, tamen la kuraĝa metiisto sukcesis poste forkurigi la bestaron, mortiginte ĉe tio lupinon. Kiel la trofeo li prenis al si la du lupetojn el lupkuŝejo, taksinte tion la justa rekompenco kontraŭ sia perdo.



De tiam anstataŭ ĉevalo Repeĉek disveturis je tiuj ĝemeloj, al kutimiginte ilin kuri je la jungaĵo. Foiroj, histrionejoj, popolaj festoj – la entreprenema ĉeĥo ĉeestis ĉie kun siaj grizaj “trotĉevaloj”. Printempe 1909 Repeĉek ekveturis por mirigi la ĉefurbon de la Rusia imperio – Sankt-Peterburgon – decidinte traveturi je siaj lupoj la tutan landon. Li ne havis kaŭzojn por tro hasti – kun tia bestaro ja famo estis al li garantiita – do en ĉiu vilaĝo aŭ urbo li haltis por veturigadi infanojn kaj aranĝi spektaklojn kontraŭ modesta pago. La rapido de la ĉareto, kies forto egalas al la du lupaj povoj, estis averaĝe 60-70 verstoj tage laŭ bona vojo kaj iom mapli laŭ tiu malbona.

Somere 1910 la “arbara frataro” alkuris Tjumenon, kie la tutan kompanion fiksas la loka fotisto Rodionov. Verŝajne tio estis lasta fotajo de la metiisto-vojaĝisto. Apenaŭ forlasinte Tjumenon, Repeĉek malsaniĝis kaj baldaŭ forpasis en la apuda vilaĝo Uspenka. Liajn “trotĉevalojn” prenis al si la vilaĝano Riĵkov, sed ili tre sopiris sen sia mastro kaj nur mallonge postvivis lin. Kaj nun malnovaj urbanoj ankoraŭ longe ridigis nepojn per rakontoj pri la lupa jungitaro, kurinta laŭ la ĉefaj stratoj de Tjumenon...

Kultura projekto

Rusaj popolaj kantoj de la 20-a jarcento

Karaj amikoj! La projekto ekmoviĝis. Venas la unuaj specimenoj de la tradukoj. Ĉifoje estas prezentata unu el la plej akre-lirikaj kantoj, kiu, malgraŭ ŝajna simpleco, esprimas animajn movojn pli ĝuste ol verkoj de grandaj poetoj. La kanto aperis ne pli malfrue ol komence de 1950-aj jaroj (sed, eble, je 1-2 jardekoj pli frue). Ĝi estis la unuan fojon —oficialel prezentita en 1959 teatraĵo de A. Volodin —Kvin vesperojll (reĝisoro – G. Tovstonogov), poste sonis en 1969 en kinfilmo —Strangaj homojl de V. Ŝukŝin, kio aldonis al ĝi popularecon.

Миленький ты мой

-Миленький ты мой,
возьми меня с собой,
Там в краю далёком
буду тебе женой. / 2 раза
-Милая моя,
взял бы я тебя,
Но там в краю далёком
есть у меня жена.

-Миленький ты мой,
возьми меня с собой,
Там в краю далёком
буду тебе сестрой. / 2 раза

-Милая моя,
взял бы я тебя,
Но там в краю далёком
есть у меня сестра.

-Миленький ты мой,
возьми меня с собой,
Там в краю далёком
буду тебе чужой. / 2 раза

-Милая моя,
взял бы я тебя,
Но там в краю далёком
чужая ты мне не нужна. / 2 раза

Mia korinklin'

-Mia korinklin',
Prenu do, kara, min,
Mi en lando fora
Estu por vi edzin'. / 2 foje

-Mia karulin',
Mi ja prenus vin,
Sed en la lando fora
Atendas min edzin'.

-Mia korinklin',
Prenu do, kara, min,
Mi en lando fora
Estu por vi fratin'. / 2 foje

-Mia karulin',
Mi ja prenus vin,
Sed en la lando fora
Atendas min fratin'.

-Mia korinklin',
Prenu do, kara, min,
Por vi en lando fora
Estu mi fremdulin'. / 2 foje

-Mia karulin',
Mi ja prenus vin,
Sed kiel fremdulinon
Mi ne bezonas vin. / 2 foje

Esperantigis *Semen Vajnblat*
21.11.1982

La alia prezentata popola kanto estas la plej fama “ŝtelista” kanto “Murka”. Ĝi ekzistas en du ĉefaj variantoj – la unua (plej frue “oficiale” eldonita en 1936-a jaro sur vinildisko) estas simpla “kruela romano”, la krimula fono estas tre febla en ĝi. Tamen, la historio en la plej konata(j) varianto(j) aludas pri penetro en la odesan bandon de argentino, pro kiu la polico frakasis la bandon, kaj pri venĝo al tiu perfidulino. Interese, ke komence, en la unuaj scribe fiksitaj variantoj el 1934 (kaj ankoraŭ mallertaj, ne poluritaj poezie), en la kanto rolis “Lubka”, poste – “Maŝa”, kaj nur poste la heroino fariĝis Murka... Por tio estis eĉ kreita legendo pri iu reala argentino, kiu ja elvivis – pri tio estis verkitaj noveloj kaj kteitaj filmoj... La eventoj kaj realaĵoj en tiu varianto aludas pri komenco de 1920-aj jaroj – do, eble ĝi estas la unua. Do, jen du versioj de la kanto en du malsamaj tradukoj. Foje oni atribuas la aŭtorecon al fama en 1920-aj-30-aj jaroj kanta aŭtoro Jakov Jadov, sed tio havas neniujn pruvojn. Eĉ se jes, li povis gari prilaboron de la popola teksto por fari la “kruelan romancon”, sed ne unu el la plej konataj variantoj, kiuj plene formiĝis fine de 1940-aj jaroj.

Murka (unu el klasikaj “ŝtelistaj” variantoj)

Прибыла в Одессу банда из Ростова,
В банде были урки-шулера.
Банда управляла темными делами,
А за ней следили мусора.

Вот пошли облавы, начались
провалы,
Много наших стало пропадать.
Как узнать скорее, кто же стал
шалавой,
Чтобы за измену покарать?

Верх держала баба – звали ее Мурка,
Хитрая и смелая была.
Даже злые урки – все боялись Мурки,
Воровскую жизнь она вела.

Раз пошли на дело, выпить
захотелось,
Мы зашли в шикарный ресторан.
Там она сидела с агентом из МУРа,
А из-под полы у ней торчал наган.

Мурка, в чем же дело, что ты не
имела?
Разве я тебя не одевал?
Кольца и браслеты, юбки и жакеты
Разве ж я тебе не добывал?

Venis al Odeso bando el Rostovo,
La ŝtelistoj regis en la band’.
Ilin tre atente Gubĉeka observis:
Estis band’ konata en la land’.

Baldaŭ komenciĝis en la band’ arestoj,
Multaj trafis rekte al prizonoj.
Kaj decidis knaboj tuj ekscii, kiu
Estas en la band’ perfidperson’?

Inter la ŝtelistoj agis ino Murka
Kaj estimis la banditoj ŝin,
Estis tre kuraĝa kaj terure ruza
Tiu tre danĝera belulin’.

Al afer’ ni iris – drinki ekdeziris,
Al drinkej’ ni venis en vesper’.
Gubĉeka agento sidis apud Murka -
El-sub bask’ videblis revolver’.

Murka, mono gravas! Kion vi ne havas?
Mi ĝis nun perfekte vestis vin!
Multaj braceletojn, jupojn kaj jaketojn
Mi por vi akiris, karulin’?

Здравствуй, моя Мурка, здравствуй,
дорогая,
Здравствуй, дорогая, и прощай!
Ты зашухарила всю нашу малину,
А теперь маслину получай.



Bonan nokton, Murka, bonan nokton,
kara!
Ĝisrevidas ni en aĉa hor'!
Vi perfidis nian tre konatan bandon,
Do, ricevu kuglon al la kor'.

*Esperantigis Semen Vajnblat,
Januaro 2002*

Murka (variante en formo de “kruela romano”)

Здравствуй, моя Мурка, Мурка
дорогая!
Помнишь ли ты, Мурка, наш роман?
Как с тобой любили, время
проводили
И совсем не знали про обман...

А потом случилось, счастье
закатилось,
Мурка, моя верная жена,
Стала ты чужая и совсем другая,
Стала ты мне, Мурка, неверна.

Как-то, было дело, выпить
захотелось,
Я зашел в шикарный ресторан.
Вижу — в зале бара там танцует
пара —
Мурка и какой-то юный франт.

Тяжело мне стало, вышел я из
зала
И один по улицам бродил.
Для тебя я, Мурка, не ценней
окурка,
А тебя я, Мурка, так любил!

Mia kara Murka, mi al ci salutas.
Ĉu rememoras nia ard'?
Kiel ni kunamis, ĝuon kunaklamis
Kaj eĉ ne imagis pri kovard'.

Sed malbono venis, la feliĉo svenis,
Murka, la fidela konkubin'.
Tute ci fremdiĝis, plene malardiĝis.
Kaj abrupte ci perfidis min.

Ekis la afero, vokis soifero,
Lukso de drinkejo logis min.
Vidas mi en halo, flirtas en la balo
Murka kaj dandaĉo dum kulmin'.

Mia mens' obskuris, kaj mi tuj elkuris
Kun la kap' pri Murka-halucin'.
Ja por cia gloro estas mi mal-oro,
Murka, sed mi ege amis cin.

У подъезда жду я, бешено ревную.
Вот она выходит не одна,
Весело смеется, к франту так и
жмется —
Мурка, моя верная жена!

Ĉe la pord' mi gardas, pro ĵaluzo ardas,
Vidas, ke la dando gvidas ŝin.
Ĝoje ŝi ridetas, al la dand' impetas
Murka, la fidela konkubin'.

Я к ней подбегаю, за руку хватаю:
Мне с тобою надо говорить.
Разве ты забыла, как меня
любила,
Что решила франта подцепить?

Ekas mi elanon, kaptas ŝian manon.
Mi insistas pri interparol'.
Ĉu ci ne memoris, kiel ni amoris,
Ke ci kroĉis dandon por ĉi-rol'?

Мурка, в чём же дело, что ты не
имела?
Разве я тебя не одевал?
Шляпки и жакетки, кольца и
браслетки
Разве я тебе не покупал?

Murka, kio kaŭzis, ke ci min eknaŭzis?
Ĉu mi ne tre bone vestis cin?
Ĉapojn kaj ĵaketojn, ringojn, braceletojn
Ĉu ci ne akceptis kun fascin'?

Здравствуй, моя Мурка, Мурка
дорогая,
Здравствуй, моя Мурка, и прощай!
Ты меня любила, а теперь забыла
И за это пулю получиай!

Mia kara Murka, mi al ci salutas.
Kaj post la saluto – malsalut'!
Perfidita amo estas melodramo,
Do ricevu kuglon pro la tut'!

*Esperantigis Vladimir Minin,
Januaro 2019*

CERBE kaj KORE
n-ro 7 (75), marto 2019

Kultura suplemento al Bulteno de REU (BdR) n-ro 102
BdR estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo
“RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe
de ĝusta indiko de la fonto

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-
metodikajn kaj scienc-popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi
ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru .

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 12.03.2019